

Wilhelm Busch,
Flu' de l' temp'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Obstine pluas la tempflu';
la estanteco pasas plu.
El iu rezerveja mar'
konstante fluas jar' post jar';
kaj el la mar' leviĝas sor
de l' homoj bunt-miksita ĥor',
plaŭdadas gaje aŭ malĝoje,
kaj ree subakviĝas foje.
Malvarmigitaĵ ili por
pli longa tempo restas for.
Rigardas oni ĉirkau si,
ĉu tiu aŭ ĉu tiu ĉi,
ne febliĝinte je la fin'
ankoraŭ supren levas sin.

*Traduko de la Germana poemo "Fluss der Zeit" de WILHELM BUSCH (*1832-04-15 – †1908-01-09) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2001.*

MR-338-2 / Arg-431-850 (2008-01-31 15:52:58)